

# La Brita Esperantisto

Majo-Junio 1985



Membroj de la LKK kaj helpantoj atendas la alvenon de la kongresanoj.

La

# Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

81/A Jaro, N-Ro 864

Majo-Junio 1985

**Eldonas:**

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON  
W11 4UF.

Tel. 01-727-7821

**Redaktoro:**

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

## *Form of Bequest*

I ..... give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.



## BUCKINGHAM PALACE

The Prince of Wales has asked me to send his very best wishes to all the delegates attending the 69th British Esperanto Conference for a most enjoyable and successful Conference.

*Your Sincerely*

*Edward Adeane*

Private Secretary

Post la unika mesaĝo de la Brita Ĉefministro al la Brita Kongreso en Llandudno venis, lastmomente, ankoraŭ alia, ĉi-foje de Lia Reĝa Moŝto la Princo de Kimrujo.

Ĝi venis per lia Privata Sekretario kaj tradukiĝas jene:

## PALACO BUCKINGHAM

De Lia Moŝto Edward Adeane

27-an Marto 1985

*La Princo de Kimrujo petis al mi sendi liajn plej bonajn dezirojn al ĉiuj delegitoj ĉeestantaj la 69-an Britan Kongreson de Esperanto anticipe al plej agrabla kaj sukcesoplena Kongreso.*



## 10 DOWNING STREET

THE PRIME MINISTER

Through the continuous advance of modern technology we can, today, pick up a telephone and talk to almost any part of the world, clearly and quickly. We can talk but very often we cannot communicate.

Communication depends upon understanding each others language or having a common language. Language is now the greatest barrier to communication and understanding, dividing the world, and any and all efforts to overcome it deserve encouragement. Peace, trade, cultural links and so much else depend upon our ability to talk to each other.

Your conference has the worthy objective of improving international understanding through the removal of language barriers and I wish you well in your deliberations.

De la Brita Ĉefministro, Sino Margaret Thatcher, la Loka Kongres-Komitato de la 69-a Brita Kongreso de Esperanto kiu okazos dum la Paska semajnfino en Llandudno, Kimrujo, de la 5-a ĝis la 8-a Aprilo 1985, ricevis tre kuraĝigan mesaĝon kiu tradukiĝas jene:

LA ĈEFMINISTRO 10 DOWNING STREET

*Pro la daŭra progreso de la teknologio ni povas jam hodiaŭ, ekpreni telefonon kaj paroli al preskaŭ kiu ajn parto de la mondo, klare kaj rapide. Ni povas paroli, sed tre ofte ni ne povas komuniki.*

*Komunikado dependas aŭde reciproka interkompreno de niaj lingvoj aŭ de la posedo de komuna lingvo. Lingvo estas nun la plej granda barilo kontraŭ komunikado kaj inter-komprenado, dividante la mondon, kaj ĉiaj kaj ĉiuj penoj por*

*superi ĝin meritas kuraĝigon. La paco, komerco, kulturaj ligoj kaj tiom da aliaj aferoj dependas de nia kapablo povi paroli unu kun la alia.*

*Via kongreso havas la meritoplenan celon plibonigi internacian komprenadon per la forigo de lingvaj baroj, kaj mi bondeziras al vi en viaj diskutoj.*

(Subskribita de) MARGARET THATCHER

## ALVOKO DE ĈINAJ SCIENCISTOJ

Kun ĝojo ni informas vin, ke la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj fondiĝis la 15-an de junio, 1984 (vidu El Popola Ĉinio n-ro 9/84). Ĝi kiel alia burĝono de la E-movado aperis en la oriento de la tero. Ni esperas, ke vi sendos al ni leterojn, bildkartojn, se eble, ankaŭ librojn kaj gazetojn precipe rilate sciencajn kaj teknikajn en Esperanto por subteni nian laboron. Ni antaŭdankas vin pro via afableco!

Post la fondiĝo de nia asocio ni klopodas akiri la subtenojn de koncernaj instancoj kaj de multaj altranguloj, funkciigis kelkajn E-kursojn kaj preparas la aperon de nia faka gazeto "Scienco kaj Esperanto". Estas espereble ke ĝi eldoniĝos ekde 1985.

Ni deziras kontaktiĝi kun eksterlandaj samfakuloj ĉu koresponde ĉu renkontiĝe kun la celo interŝanĝi fakajn problemojn kaj spertojn en aplikado de Esperanto. Ni ankaŭ volas kunlabori kun ĉiuj fakuloj kaj fakaj organizoj en- kaj eksterlandaj. Tiucele ni volas kaj povas aranĝi en Pekino personajn aŭ grupajn rekontiĝojn de sciencistoj kaj teknikistoj kaj ilian vizitadon en nia lando. Internaciaj simpozioj okazontaj en la mondo interesas nin kaj, se eble, ni partoprenos kaj volas ricevi de ĝi koncernajn informojn antaŭ kaj post ĝia okazigo.

La 71-a UK en 1986 en Pekino estas bona ŝanco por nia renkontiĝo. Ni esperas, ke multaj fakaj esperantistoj venos al Pekino okaze de la Kongreso. Bonvenon al vi!

Okaze de la nova jaro 1985 ni deziras al vi sanon kaj feliĉon kaj salutas vin samideane.

**Wang Yuchun**

Sciencista kaj Teknikista  
Esperanto-Asocio de la  
Ĉina Akademio de Sciencoj  
Fuxingmenwei Sanlihe  
Beijing, Ĉinio

## NEKROLOGOJ

**Claude Edwin Meakin**, 88-jara, pace mortis en sia hejmo en Burton Joyce la 19an de februaro 1985. Antaŭe prezidanto de J. Hardy & Co. Ltd. Postrestas vidvino, du filoj kaj du filinoj. La plej maljuna ano de Nottingham and District Esperanto Society, li estis unu el grupo de Boys' Brigade sub gvido de George Osborne Crawley, kiu ĉeestis la Sepan Universalan Kongreson de Esperanto en Antverpeno, 1911, kie li renkontis d-ron Zamenhof.

Estas kun profunda malĝojo ke ni devas anonci la forpason de **S-ino Eunice Hughes**, Canterbury, je la 30-a de Januaro 1985. La tuta Esperantista Movado funebras ŝian morton, car ŝi senlace laboris ne nur por la blindula Esperantista Movado kaj nacie kaj internacie, sed kiel reprezentanto por E.A.B.

Eunice naskiĝis la 29-an de Julio, 1926 kaj lernis Esperanton ĉirkaŭ 1950. Krom ŝia laboro por Esperanto ŝi multe helpis en diversaj volontaj organizaĵoj, kiel ekzemple, "Zorgasocio" por viziti izolajn maljunulojn.

Ŝia forpaso lasas grandan mankon en la komunumo.

## VIZITO AL ESPERANTO-KLUBO

Je la 24a de januaro, dum vizito al Moskvo okaze de la Burns-Federacia Jar-Festeno, ni trafis okazon viziti Esperanto-klubon. Laŭ nia programo vespero estis libera dum la vizito, kaj kiel kutime ni kunportis kun ni la Jarlibron de UEA. Do traserçinte la paĝojn, ni rimarkis nigran steleton kaj telefonan numeron apud la urbonomo.

En nia hotelĉambro ni ciferis la numeron kaj parolis Esperante al la respondinto; virina voĉo respondis al mi, kaj mi demandis, kie kaj kiam kunvenos la Moskva klubo. Ŝi informis min, kie kaj kiam. Bonŝance la klubo kunvenos en tiu vespero, kiu estis taŭga por ni, do mi notis la adreson.

Sur karto mi presliteris la adreson en kirila alfabeto, kaj je taŭga horo mendis taksi-fiakron por veturigi nin al la klubejo; mi montris al la koĉero la karton kun la adreso, kaj ni estis survoje.

Kiam ni atingis la adreson, viro juna atendis nin ĉe la enirejo. Li bonvenigis nin kaj kondukis nin al la kunvena ĉambro, kie la Prezidanto diris al ni salutajn vortojn. Invitiinte nin sidigi, li malfermis la kunvenon kaj gvidis la kutimajn aferojn de la kunveno, kiuj ne daŭris tro longe.

Poste la Prezidanto invitis nin paroli al la geanoj. Mi parolis pri mia intereso en Esperanto, pri la movado en Skotlando kaj Britujo, kaj pri la Fervojista faka movado, de kiu mi estas ano. Kiam mi finis mian parolon, la ĉeestantaro starigis multajn demandojn al mi, kiuj sekvis unu alian en tre interesa maniero.

Ni disdonis inter ili bildkartojn pri Robert Burns, la mondfama skota poeto, kies verkoj estas tradukitaj en la rusan lingvon de la rusa verkisto Marŝak. Ili interesigis pri la fakto, ke multaj el la poemoj kaj kantoj estas tradukitaj en Esperanton de skotaj geesperantistoj. Poste s-ino Harvey deklamis al ili unu verkon el la Burnsa poemaro, kaj s-ro Wilson kantis skotajn kantojn. Poste ni kune kantis.

La klubanoj dankis nin kaj invitis nin sidigi ĉe tablo, sur kiu estis kukoj, biskvitoj, ktp. Ni trinkis tasojn da teo, kaj ni ĉiuj babilis kaj interŝanĝis adresojn. La horoj pasis tro rapide, kaj venis la horo por la fermo de la kunveno. Mi demandis pri nia revena vojaĝo al la hotelo, kaj la grupo informis nin, ke ili kondukos nin al la hotelo per la famkonata Metro. Ni promenis tra parko kaj atingis stacidomon de la subtera fervojo, la Metro, pri kiu la loĝantoj de la urbego estas treege fieraj.

La konstruaĵoj ekstere estas mirindaj, sed vere belegaj estas la internajoj. Vortoj ne povas ĝuste priskribi la internan dekoradon. Tial la usona aktoro, Bob Hope, ŝerce komentis dum sia vizito al la urbego: "la moskvanoj nun konstruas siajn katedralojn subtere". Krom la dekorado, la servado estas elstara. La temp-intervalo de unu trajno al la sekvonta estas naŭdek sekundoj, la halt-daŭro en stacio estas tridek sekundoj, la vojaĝkosto estas tre malalta: kvin kopekoj (kvin pencoj laŭ brita mono), kaj estas la sama, ĉu oni veturas nur unu haltejon aŭ la tutan longecon de la linio. La kosto en aŭtobusoj estas kvar kopekoj, kaj en tramoj nur tri kopekoj, je la samaj vojaĝkondiĉoj. En la Metro la aero estas regule refreŝigata, kaj la temperaturo estas ĉiam la sama: 68F aŭ 20c somere kaj vintre.

La trajnoj iradas de 06.00 ĝis 01.00 je la sekvonta mateno. Inter tiuj horoj la purigistoj kaj metiistoj okupas la tutan sistemon por farado de necesaj laboroj.

Post la vojaĝo per la Metro al la stacio apud nia hotelo, ni atingis la stratnivelon per moviĝanta ŝtuparo kaj piediris al la alia flanko de la strato per tunelo por piedirantoj ĝis la enirejo de la hotelo.

Ni dankis la klubanojn por la tre feliĉa kaj amikema vespero, kiun ni spertis inter ili, kaj ili reciproke dankis nin kaj salutis nin bonkore. Ni vere sentis la varmecon, komprenon kaj afablecon de la renkonto, kiu pere de Esperanto donis al ni memorindan sperton en tre bela urbego.

**Peter Harvey**

## “ESPERANTUJO” – La Verda Sap-Opero

---

Pro la sezona ferio je la fino de la jaro, kiam la infanoj estis hejme de la lernejo, mi devis suferi pli da televido ol kutime kaj mi trovis, ke vole-nevole trafis min kelkaj el tiuj senfinaj sap-operoj, kiuj ĉiutage gluigas homojn al la aparato.

Vidinte unu-du epizodojn mi decidis kontroli, en la programaro, kiom da sapoperoj vere estas nun en la brita televido, kaj mi trovis jene: “Coronation Street”; “Crossroads”; “Brookside”; “Take the High Road”; “The Sullivans”; “Falcon Crest”; “Dynasty”; “Dallas”; – eĉ nun mi ne scias ĉu mi kalkulis ĉiujn.

Farinte tion, pro eksvebo de ideoj en mia menso, mi decidis studi la aferon pli profunde – mi trafis plurajn epizodojn de du el la importatoj el Usono – “Dynasty” kaj “Dallas”. Mi elektis tiujn ĉar ili estas la plej furoraj laŭ publiko. Mi konatiĝis kun la karakteroj kaj sekvis la daŭrigon de la historioj.

Ambaŭ programoj temas pri grandaj familioj, pri la manovroj kaj aventuroj inter la familianoj kaj ekstere rilate la entreprenojn kiuj kunligas ilin. La ĉefa ingredienco por tia programo estas potenca fripono kiu manipulas ĉiujn aliajn – en “Dallas” estas ‘J.R.’ kaj en “Dynasty” estas ‘Alexis’ (friponino!). Kontraste kun tiuj estas la familiestroj ‘Miss Ellie’ kaj ‘Blake Carrington’ respektive. Inter la du, en ambaŭ kazoj, ŝvebas la aliaj rolantoj, manovrante bone aŭ malbone laŭbezone.

Studante la aferon mi pensis pri nia granda familio – la Esperanto-movado. Ĉu ni havas tiajn homojn? Ĉu vi rekonas iun ‘Miss Ellie’ aŭ ‘J.R.’ inter viaj verdaj konatoj? Kiu estas la verda ‘Clayton Farrow’ el “Dallas”? Ĉu ni havas eĉ ‘Alexis’ inter ni? Kaj kio pri ‘Sue Ellen’, kiu emocias dirante nur *bonan matenon!* Ĉu

vi konas allogul(in)ojn kiuj, laŭaspekte, laŭŝminke, laŭvestaĵe, laŭjuvele povus plenumi la bezonojn por tia programo? Se vi jam respondis jese al tiuj demandoj daŭrigu la gadon!

Ĉu en nia brita movado, en la Asocio, la federacio aŭ la grupo, okazas sufiĉe da intrigoj por longedaŭra programo? Ĉu en via grupo iu manovras la balotadon por esti grupsekretario? Ĉu la kasisto bone vivas kaj ferias? Ĉu iuj klubanoj regule pariĝas? Ĉu la grupestro ofte proponas grup-ekskursojn aŭ federaciajn kunvenojn en iu aparta urbo? Ĉu la samaj grupanoj ĉiam partoprenas Universalajn Kongresojn?

Se vi povas respondi *jese* ankaŭ al ĉi tiuj demandoj ni venu nun al la plej gravaj demandoj! Ĉu nia estraro maltrafas bonegan okazon por allogi la publikon al Esperanto? Kial unu el niaj longedaŭraj samideanoj ankoraŭ ne verkis historion, surbaze de la brita movado, por propono al B.B.C. pri eventuala Esperanta sap-opero? La publiko trafe informiĝus pri la daŭra evoluado de Esperanto kaj la belaj aventuroj kiuj trafas multajn el tiuj kiuj eniras “Esperantujon” – kaj jen la titolo!

Do, vekigu verkistoj – jen projekto por nia Jubileo!

**Valentino.**

---

**Sap-opera** = Soap-opera – la vorto venis el Usono, el la kutimo de la grandaj komercaj entreprenoj financi radio- kaj televido-seriaĵojn kaj samtempe reklami siajn produktojn.

## ARBOJ ANSTATAŬ BOVINOJ

Pli da manĝaĵo produktiĝas en la mondo hodiaŭ ol iam antaŭe – kaj estas pli da malsatantoj. “Ĉiun duan sekundon de la jaro mortos infano pro malsato aŭ malsano!” (Willy Brandt, “Komuna Krizo”, paĝo 10) Laŭ F.A.O., Brandt kaj aliaj aŭtoritatoj, la situacio nur malboniĝos se nunaj direktiĝoj daŭros. Socia malpaco kaj milito nepre rezultos.

La baza kaŭzo de la ĝeno estas ne nur ke ekzistas pli da homoj por manĝigi; sed ke la esencaj rimedoj de tero, akvo, sterko kaj homa kapableco estas uzataj por kultivi luksajn rikoltaĵojn por la riĉaj kaj potencaj, furagojn por ties brutaro, kaj eĉ benzin-anstataŭaĵon por iliaj aŭtomobiloj.

Konstato kreskas ke plej multaj bestaĵoj devus esti klasifikitaj kiel luksaj produktaĵoj. Ili estas jam pruvitaj kiel nenecesaj por la homa sano: ilia trokonsumado kuniĝas kun la malsanoj de riĉeco, kaj ilia produktado malŝparas la provizojn kiuj devus esti uzataj laŭ la plej rigora ekonomio se la kreskantaj milionoj da homoj estu manĝigotaj, iliaj aliaj bezonoj plenumitaj kaj ĉirkaŭa sano atingota por estontaj generacioj. La solvo de la monda manĝproblemo estas ĉe la plantoj – ĉefe arboj.

Arboj estas planteblaj en lokoj netaŭgaj por plugrikoltaĵoj: la nutra valoro de la rikoltaĵo de ĝuste elektitaj specoj estas multe pli ol tiu de kaj bestaj kaj plugaj rikoltaĵoj. Ili purigas la aeron, haltigas erozion, inundojn kaj sekecon. Ili atingas multajn aliajn bezonojn.

Tamen, dum la historio la riĉaj kaj potencaj emis manĝi bestojn. Tial “Pliiĝantaj normoj de vivrimedo” egaliĝas kun la konsumado de pli da bestaj produktaĵoj.

Provoj krei dieton riĉan de best-produktaĵoj atingeblan por ĉiuj nur detruos la ĉirkaŭaĵon. Limigi best-produktaĵojn al la riĉaj kaj potencaj nur pliigos ilian prestiĝon kaj kaŭzos socian malpacon. Ĉia provo devus esti entreprenata por levi la prestiĝon de la plantaja

dieto – ties avantaĝoj nun iĝas vaste rekonataj – kaj de laborintensa agrikulturo kaj arbaj rikoltaĵoj. Nur tiam povos ege pliigiĝinta mondpopolo esti nutrata sen kaŭzi neripareblan difekton ĉirkaŭaĵan.

Ĉu ni sufiĉe zorgas pri la malsatantaj milionoj hodiaŭ kaj pri niaj infanoj morgaŭ por ŝanĝi nian dieton?

Verkis **K. Jannaway.**

Elanglisigis **H. Fillingham.**

El “**The Vegan**”, Vintro, 1983.

### Adamo kaj Eva en Edeno

Ekvidis Evan Adamo  
Kaj fiksrigarde staris!  
Ŝin li supozis fuŝprodukt’;  
Ke la Sinjor’ eraris!  
Kunulo al li mankis, do,  
Preĝante, li plorplendis;  
Samsimilulon volis li,  
Do, Superviron mendis.  
Sed Ev’ alvenis, kaj jen tut’,  
Ne troe ŝi babilis;  
Sub brila sun’ la florgarden’  
Al paradiz’ similis.  
Kaj Ho! Laŭ nia kronikist’  
Almensa, sed instanca,  
Kvankam ĉia evidentec’  
Estas nur cirkonstanca –  
Al tiu proprietaj’ Eden’  
Alvenis zorg’ kaj ĝeno;  
Ne kulpis tiu Supervir’  
Sed Ev’, eta virino!  
Ĉar maskla estis ŝia Di’  
Kun vir’ ŝin parigante;  
Aldone, venis serpentul’  
Ŝin al tentaj’ gvidante.  
Tiam Kain’, ankaŭ Habel’  
Naskiĝis kaj mamsuĉis;  
(Pli poste, jes, vi pravas jam,  
L’unu l’alian buĉis!)  
Tro okupita estis Ev’  
(Kunkudris figfoliojn);  
Se iam biografos ŝi,  
Ĉu verkos ŝi fabelojn?

**Hilary Gilmore**



## LAŬ MIA OPINIO . . .

### Naturaj leĝoj de la Esperantismo

Kun intereso mi legis la “leĝojn” sur p. 27 de la marta-aprila n-ro. Unu el ili ne trafas la esencon de la afero, la alia estas malĝusta. Sube mi donas tekstojn, kiujn mi opinias adekvataj, kun la peto publikigi.

#### *Leĝo de la Fina Venko*

Pene konstruadi ponton al la celo, ĝue eksplodigi ĝin antaŭ la finkonstruo, pigre ripozi sur la rubo, rekomenci la penan konstruadon, reeksplodigi, reripozi, rekomenci, ktp. ĝis la fina venko aŭ – malvenko.

#### AŬ

Tri paŝoj antaŭen, unu retropaŝo, kvar paŝoj antaŭen, kvin retropaŝoj, ktp. ĝis la paŝoj antaŭen atingos la celon, aŭ la retropaŝoj – la starton.

#### *Leĝo de la Neŭtraluloj*

*Generale:* Kiu intelekte kaj emocie indiferece egaligas honestecon kaj malhonestecon, viktimon de krimo kaj krimulon, observanton kaj piedpremanton de la homaj rajtoj, demokration kaj totalismon, tiu estas perfekte neŭtrala kaj restos tia ĝis li/ŝi fariĝos viktimo de krimo aŭ persone spertos foreston de homaj rajtoj kaj totalismon.

*Aparte en la Esperanto-Movado (kaj responde al la difino sur p.27 de BE):*

Kiu siatempe ne estis nazio aŭ ne tenis sin pasive rilate naziismon (ekz. okaze de la Kolonja Kongreso), tiu ne estis politike neŭtrala; kiu ne estas por-sovetiisma aŭ ne tenas sin pasive rilate sovetiismon (distingendan, parenteze dirite, disde diversaj variantoj de komunismo), tiu ne estas politike neŭtrala.

El homeca vidpunkto fieri povas tiuj, kiuj ne estas “neŭtralaj” en la supraj sencoj.

**Ivo Lapenna**

### Samuel Pepys

Mi ŝatis la artikolon de Sandra Slade (BE 862, paĝo 7) pri taglibroj, kun la amuzaj citaĵoj, sed ne estas ĝuste ke Samuel Pepys skribis sian taglibron en ĉifro. Multaj homoj kredas ke li tiel faris – mi ne scias kial. Efektive li uzis stenografion – tiun de Thomas Shelton, kies libro “Shorte Writinge” (Mallonga Skribo) unue eldoniĝis en 1626. Pli malfruaj eldonoj de tiu-ĉi libro ekzistas, kaj ebligis la spertulojn legi la renoman taglibron de Pepys.

**J. G. Foster**

### Internacia komerco

Ni trovis vian adreson jam de longe, ĝis nun ni povas korespondi kun vi pro tio, ke nia grupo de komercinterpretistoj ĵus fondiĝis.

Ni opinias, ke ni ĉiuj devus praktiki Esperanton ĉe komerca korespondado kaj ĝi pli kaj pli disvolviĝos en komercado. Tial ni skribas al vi, ke ni volus kunlabori kun vi. Ĉu vi volonte helpus min? Se jes, do ni elkore esprimas al vi grandan antaŭdankon!

Mi petas, ke vi serĉu aĉetsekciestron, komerciston kaj aliajn, kiuj volus aĉeti objektojn el Ĉinio. Bonvolu skribi detale, kiu aĉeti, kian objekton, kiom, da, ĝian grandecon kaj prezon al ni. Estas pli bone, se vi povus sendi specimenon.

Mi nomiĝas Wang Yong Hong, 25-jara, fraŭlino kaj loĝas en ĉefurbo HeFei de Provinco AnHui, Ĉinio. Atendante vian respondon, mi esperas, ke nia afero sukcesos!

Saluton!

**Wang Yong Hong**

(Legantoj dezirantaj skribi al f-ino Wang povas ricevi ŝian adreson de nia londona oficejo. – Red.)

### Fair Play

Kiam mi unuafoje vizitis Germanujon mi rimarkis, ke la knaboj ĉe la piedpilko-ludo uzis anglan vorton “fair”; “Nein, das darfst du nicht, das ist

nicht fair". ("Ne, tion vi ne rajtas fari, tio estas ne fair"). Mi demandis kial, kaj oni respondis, ke neniu germana vorto havas precize egalan sencon, do ili prunteprenis vorton de ni.

Al mi mankas tiu vorto ankaŭ ĉe Esperanto. Justa, egala, ĝusta, ktp. ne rekte frapas la najlon kapcentre. Justa en la senco de senpartia, i...jes, tamen la mosea leĝo "okulo por okulo, dento por dento, vundo por vundo" estas tute senpartia kaj persistas ĝis hodiaŭ en mondogpartoj, kie la koncepto de "fair" ankoraŭ ne evidentiĝas. Ĝi modifiĝis en landoj, kie nur post long-longaj jarcentoj oni finfine evidendis, ke tia justeco ne sukcese funkcias. "Fair" entenante senton de modero, humaneco, proporcio, inteligenteco, kompromiso kaj kompreno, eĉ pardono, promesas esperon de solvo kaj plibonigon de iu-ajna situacio.

Se tia adjektivo neologisme bezonatas, kiel ĝin esperantigi? Angle skribita ĝi alproksimiĝas tro al "fajr" kaj la angla prononco similas tro al "fer". En la vortaro mi trovas "Fair [com. Teut.; OE faeger cf. OHG fagar]" Nu vidu! La vorto venas al la anglo-saksanoj el Germanujo, eble ĝi venis *kun* la anglo-saksanoj el Germanujo. Do, ni havas vorton por "fair". Mi serĉas en PIV. Mi trovas, ke *fagaro* estas arbaro de fagarboj. Ne gravas, mi serĉos en latina vortaro. Jen – *Aequus* – just, fair, equal, ktp. Sed esperante aekva iom tro similas al akva; pli bona estus "ekva". Bone, ni havas vorton por "fair". Mi serĉas en PIV. "*Ekvo*. G. de mamuloj el la subordo neparhufuloj al kiu apartenas azeno ... .." (Ege malfacila estas eltrovi neologismojn!) Eble jam troviĝas taŭga bela vorto en iu alia lingvo; oni diras ĉiam, ke la Grekoj havas vorton por ĉio. Ĉu "etiko"? Mi rigardas en PIV "*Etiko*. Scienco pri la moralo. *Etika*. Morale bona". Jes, sed kiam estas demando pri moralo, neniu volas akordiĝi kun la aliaj, kaj "bona" ankaŭ estas afero de opinio; aldone, mi ne antaŭvidas, ke la knabo kun la pilko ĝentilvoĉe ekkantos "Pardonu, sed tio estas ne etika".

Oni povas diri, ke "egalrajta" kaj "fair" samsimilas kaj mi konsentas, tamen, kiam oni volas diri, ke "fair" estas la sama kiel "egalrajta" mi, kiu ne estas harfendema persono, hezitas. La egalrajteco certe valoras por la egalpovuloj sed la malavantaĝuloj ekzemple, kelkfoje eĉ ne kapablas sin servi de siaj egalrajtoj, kaj dependas de la "fair" konduto de aliaj.

En la lasta analizo verdire la justeco ne ekzistas en 'la naturo'. Oni parolas pri la ekvilibro de la naturo, neniam de ia justeco en ĝi. Do "fair" estas pli realeca koncepto kaj reprezentas la neŝanĝeblan eblon de la homoj esperi, kaj tial oni vere sentas la mankon de aparta vorto por "fair" en Esperanto.

**Karolino Gilmore**

### Seksismo

En monda kadro, okupiĝo pri seksismo estas fazo ĉefe en Germanio, Kanado kaj Britio (se juĝi laŭ "Akademias studoj I"), kaj eĉ tie nur en certaj rondoj. La kaŭzo parte estas manko de vorto por "homo" en la koncernaj lingvoj. Krom *homo* Esperanto disponas pri *tiu* kaj *ties*, kiuj estas sekse neŭtralaj.

Nu se iu esperantisto praktike bezonas senseksajn esprimojn en skribo aŭ parolo, li elturniĝu kiel li povas. Oni do ne parolu pri bezono teoria, sed nur pri bezono persona kaj fakta, ĉar la demando estas nur malvaste internacia.

Se de Saussure skribis "virgino" (aŭ Virgino?), tion saman faris ankaŭ Mihalski el poezia bezono, simile kiel li skribis belino, karino, por la okazo, sen dokta teoriado, kaj neniu ekĝemis. Mi mem imitas el Mihalski nur unu kunmeton: prostituino (anstataŭ la peza "prostituitino").

Postuli, ke -ul signifu nur viron atencas la Fundamenton, sed Rik Dalton rajtas uzi -ul kaj -ist kiel sekse neŭtralajn sufiksojn se li volas – aŭ bezonas – tion fari, kaj neniu brovon levos. Sed projekti kaj saĝumi trans propra esprimbezono ŝajnas nereale.

**R. Rossetti**

## LA ESPERANTIGO DE MASSACHUSETTS

Bernard Golden

Antaŭe en *La Brita Esperantisto* (marto-aprilo 1980, p. 325-327) mi kritike ekzamenis la esperantigon de kelkaj kanadaj loknomoj. Ĉi-foje mi pritraktos samcele la formon en la zamenhofa lingvo de *Massachusetts*, la nomo de unu el la nordorientaj marbordaj ŝtatoj de Usono. Ne temas pri ordinara propra nomo. *Massachusetts* havas malbonan famon inter pluraj generacioj de usonaj lernejanoj, kiuj devis ŝviti super la lernado de la ĝusta literado: kiom da s-literoj kaj kiom da t-literoj estas en la nomo, kaj kie ili troviĝas? Trarigardinte publikigaĵojn kaj konsultlibrojn en Esperanto, mi konstatis, ke tiu sama loknomo konfuzas ankaŭ esperantistojn.

Por kontentigi scivolemulojn, estus utile ĉe la komenco klarigi per kelkaj vortoj la etimologion de la nomo. Ĝi devenas de *Massachusett*, la nomo de algonkineparolanta indiana tribo loĝinta ĉe atlantika golfeto de la koncerna ŝtato. En la algonkina lingvo la originala vorto estis *mass-adchuseuck* 'popolo de la granda monteto', aŭ *mass-adchu-ut* 'ĉe la granda monteto'. La britaj koloniistoj aldonis la pluralsignon *s* al la tribnomo, kiu poste fariĝis la nomo de unu el la unuaj dek tri nordamerikaj kolonioj de Britio kaj fine de ŝtato en Usono.

En la kanada Esperanto-revuo *Lumo* (aŭtuno 1980, p. 19) mi trovis la nomformon "Masaŝutso". Estas evidente, ke la verkinto de la artikolo ne sciis, kiel denaske angleparolantaj loĝantoj de tiu ŝtato prononcas ĝian nomon. La esperantigo "Masaŝutso" ja estas bizara, kvazaŭ beblingva prononco. Laŭ la tre aŭtoritata usona vortaro *Webster's New Collegiate Dictionary* la ĝusta prononco estas [m<sup>a</sup>s-(e-) ĈU-zets] aŭ [m<sup>a</sup>s-(e-) ĈU-zets]. La dua variaĵo estas

malpli ofta. La Esperanta alfabeto ne povas doni la precizan prononcon, ĉar la anglaj vokaloj "a" kaj "e" ne ekzistas en Esperanto. Sed oni rimarku, ke la nomo estas kvarsilaba; nur en specialaj cirkonstancoj ĝi reduktiĝas je tri silaboj, kaj la ellasita silabo estas la dua, ne parto de la kvara kiel en la fuŝa esperantigo citita ĉi-supre. Ankaŭ rimarkinda estas la prononco de la tria silabo [ĉu]. De kie venis la "ŝu" en "Masaŝutso"? Enkrampa noto en la *Lumo*-artikolo mencias la nomformon "Masaŝuseco", registritan en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV). Jen la kulpulo! La verkinto ripetis la eraron de PIV. Ke ne temas pri preseraro en la vortaro estas evidente, se oni konsultas la artikolvorton "Bostono": "ĉefurbo de Masaŝuseco". Denove troviĝas "ŝu" anstataŭ "ĉu". Mi povas klarigi tiun eraron kiel la rezulton de miskompreno pri la prononco de la angla digramo *ch*. Oni verŝajne opiniis, ke ĝi ofte aŭ ĉiam estas prononcata [ŝ], sed tio okazas nur esceptokaze kiel en la sekvaj nomoj: la ŝtato *Michigan* [MIŜ-i-gen] kaj la urboj *Chicago* [ŝeKAG-o] kaj *Cheyenne* [ŝaj-AN] aŭ [ŝaj-EN]. Por asimili la unuajn du nomojn PIV aplikis la grafisman principon: "Miĉigano" kaj "Ĉikago". Kial, do, la redaktoroj ne agis konsekvence rilate *Massachusetts*?

Du vortaroj de francaj leksikografoj, ambaŭ eldonitaj antaŭ la apero de PIV, ĝuste esperantigas la ŝtatnomon. Léger kaj Albault registras du variaĵojn, "Masaĉusetso" kaj "Masaĉuseco", dum nur "Masaĉusetso" troviĝas en la vortaro de Waringhien. Kaj jam en 1908 Joseph Rhodes uzis la formon "Masaĉusetso" en sia angla-Esperanta vortaro. Parenteze, *Poŝatlaso de la Mondo* ne provas esperantigi tiun loknomon, kvankam aliaj usonaj ŝtatnomoj

ja havas asimilitan formon en tiu lingve kaosa konsultlibro. Inter la du akcepteblaj esperantigoj, "Masaĉusetso" kaj "Masaĉuseco", la unua pli similas al la angla skriba formo, kies lasta silabo estas *-sets*, dum la dua pli konformiĝas al la Esperanta fonetika ortografio.

Konklude, mi volas substreki, same kiel mi opiniis pri kanadaj provincaj nomoj, ke ne ekzistas nesupereblaj obstakloj malhelpantaj la asimiladon de loknomoj en Esperanto. Ne gravas ĉu temas pri nomoj de anglosaksa deveno aŭ angligitaj formoj de indigenaj nomoj – ĉu de nordamerikaj indianoj, aŭstralianaj aborigenoj aŭ novzelandaj maorioj. La tasko nepre ne estu entreprenita de diletantoj sed nur de lingve kvalifikitaj fakuloj. La laboro devas baziĝi sur profunda scio de la lingvouzo de la enloĝantoj de la respektivaj landoj, la formoj de la koncernaj nomoj uzataj internacie, kaj la principoj de transskribado kaj transliterado. Rilate al la temo de tiu ĉi artikolo, mi estas konvinkita, ke oni povas sukcese esperantigi la nomojn de ĉiuj kvindek usonaj ŝtatoj, sed oni devas fari tion laŭsisteme, analizante la etimologion kaj prononcon de ĉiu nomo, grupigante la analogiajn formojn kaj aplikante la principojn de grafismo maksimume kaj fonetismo minimume por ne kripligi ĝis nerekonbleco la skriban formon de la nomo en la Internacia Lingvo.

### **ALVOKO al ĉiuj gesamideanoj senescepte**

Okaze de la centjara datreveno de Esperanto, VETERANA ESPERANTISTA KLUBO, intencas eldoni memorlibron pri nia movado kaj ĝiaj ĉefaj pioniroj kaj longjaraj propagandistoj.

Tiu libro devas esti por la sekvantaj jarcentoj de nia movado valora dokumento pri ĝiaj junaj jaroj kaj la senlacaj laboroj de ĝiaj pioniroj.

Por atingi tiun celon, ni bezonas la helpon, recipe por la redaktado, de **ĉiuj** senescepte.

Se vi aprobas tiun projekton, bonvolu, la plej eble rapide, sendi al ni fotokopiojn de ĉiuj dokumentoj pri la evoluado de Esperanto en via regiono, en via lando kaj en la tuta mondo, laŭ viaj eblecoj. Informu nin pri la senlaca agado de tiuj pioniroj kaj eventuale de vi mem por disvastigi tiun pacan ilon, kiu estas Esperanto. Se eble depost la kreado de nia lingvo.

Al ĉiuj, kiuj estinte kaj estante, senbrue laboris kaj penis por nia afero, ni devas pensi kaj ilin honori okaze de la centjara datreveno de nia "“ESPERANTO”".

Aliparte, informu nin se vi estos preta, kiam la eldonado estos decidita, helpi ĝin finance. Tiu libro devas esti kaj estos la verko de ĉiuj kiuj partoprenos la redaktadon pere de utilaj informoj kaj kopioj de valoraj dokumentoj.

Respondu la plej eble rapide al:

R. MELO

34 Avenue de Russie

F.03700 BELLERIVE sur Allier

Franĉujo

aŭ al

S'ino J. CICOVA

u. Svobodarny 12

CS.190 00 PRAHA

Ĉeĥoslovakio

**SEMAJNFINA KURSO** por neinstruistoj kun la temo "Kiel instrui Esperanton?" okazos en la Esperanto-Domo, Belper, 19-21 julio 1985.

Gvidanto: Allan Nutton, konsilanto pri instruado de modernaj lingvoj.

Organizantoj: Albert kaj Phyllis Goodheir.

Kosto, inkl. ĉion: £30 en dulita ĉambro. £35 en unulita ĉambro (nur 4).

La semajnfino komenĉiĝos per taso da teo, 4 p.t.m. vendredon kaj finiĝos per lunĉo dimanĉon. Oni aliĝu (laŭeble frue, ĉar estas nur 13 lokoj) al D-ro Albert Goodheir, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE. Tel: 0236 21636.

## NOVAJ LIBROJ

**Konsolo de la Filozofio** de Anicius Manlius Severinus Boethius (Boecio) (ĉ480–524 aŭ 525), ellatinigita de D-ro Albert Goodheir. Eldonejo KARDO, Glasgovo 1984. ISBN 0 905149 21 1. Prezo: £3.40

Se literatura premio estus ekzistinta jam dum la eŭropa mezepoko, la ĉefverko de Boecio *De Consolatione Philosophiae* estus gajninta ĝin jaron post jaro. Tiu ĉi verko, unu el la lastaj en la klasika latina, estis tiutempe tradukita al la ĉefaj eŭropaj lingvoj; aparte menciindas la filologie gravaj tradukoj al la malnova franca, al la okcitana, kaj tiuj de Reĝo Alfredo (9a jarcento) kaj de Chaucer (14a jarcento). Kvankam tiu sisteme tre populara verko profunde influis la mezepokan pensmanieron kaj tial troviĝas ĉe la bazo de nia kulturo, ĝi estas nuntempe apenaŭ konata ekster limigitaj fakulaj rondoj. Des pli laŭdinda estas la apero de tiu ĉi traduko de d-ro Goodheir.

Klopodante tre ekzakte traduki, Goodheir tamen uzas klaran Esperantan lingvaĵon, kiu tre bone konvenas al la originalo. Estas malfacile traduki poeziaĵojn (el kiuj la verko parte konsistas) el la latina, ĉar ties poezio baziĝas sur ritma sistemo el longaj kaj mallongaj silaboj, fremda al nia metriko. La tradukinto venkas tiun malfacilaĵon; bedaŭrinde, li ne klarigas siajn principojn de adaptado, ne dedukteblajn el la traduko.

La ĉefa virto de tiu ĉi eldono estas la naŭpaĝa enkonduko de la tradukinto, kiu ne nur resumas la enhavon de la kvin partoj (t.n. libroj) de la verko, sed informas ankaŭ pri la aŭtoro, ties epoko kaj pri la teksto mem. Helpe de tiu enkonduko kaj de la notoj, nefakula leganto certe sukcesas kompreni eĉ aludojn, kiuj ne plu estas evidentaj, sed signifoplenaj por la tuto.

La malfacilecon de la verko verŝajne plej taŭge ilustras resumo:

La maljuste mizerigita rakontanto renkontas en sia karcerita ĉelo "virinon imponaspektan", alegoron de la filozofio. Ŝi diras, ke ŝi venis konsoli jaj kuraci lin. Per la argumenta metodo de la antikva greka filozofio, ŝi instruas lin pri la celo de homa vivo, pri la ekzisto kaj esenco de Dio, pri la kialo de Malbono, pri la rilato inter dia Providenco kaj homa Libereco kaj pri la koncepto de Eterneco. Rimarkindas, ke la deduktado de Filozofio ĉiam sekvas la metodon de la platona skolo. Estas do malprave, vicigi la aŭtoron inter kristanaj verkistoj. Kelkaj konceptoj tamen ŝajnas tre modernaj: La priskribo de la rilato inter Dio kaj Tempo memorigas pri la relativeca teorio de Einstein. La fascino de *Konsolo de la Filozofio* (kial la difina artikolo?) estas ĝuste la malkovro de pensmodelo, sur kiu baziĝas niaj juraj, religiaj kaj sciencaj nocioj, pensmodelo, kiu influis nian ĉiutagan vivon.

**Martin Haase**

**Vilaĝo Borovo** de Krum Velkov. El la bulgara trad. Asen Grigorov. Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 130p.

Ĉi tiu romano temas pri komunista revolucio kontraŭ la riĉa kaj potenca reganta klaso en Bulgario en la jaro 1923, kiun ĝi montras al ni laŭ la vidpunkto de unu malgranda vilaĝo. La ne disputebla 'estro' de la vilaĝo estas riĉa komercisto Nako, kiu al la vilaĝanoj simbolas la regantan potencon. La loka situacio estas komplikita pro la ĉeesto de du junaj parencoj de Nako: lia nevo Marin, inĝeniero kiun li dungas por instalii maŝinaron en nova fabriko, kaj Vanko, orfo adoptita de Nako, nun advokato, kiu loĝas kun la riĉulo kaj, ĝis la apero de Marin, supozis sin la heredonto de Nako.

La rakonto bone tenas la atenton per la interrilatoj inter tiuj tri homoj, kaj aparte inter Marin kaj ceteraj vilaĝanoj

kaj unu – du eksteruloj. La ĝustecon de la traduko mi ne kapablas apreci, kvankam mi rimarkis kelkajn erarojn kiuj supozeble ne estis en la originalo. Ĉe la fino troviĝas tri paĝoj de notoj, ĉefe glosaro, kiun mi ne rimarkis ĝis mi jam legis proksimume kvaronon de la libro, kaj en kiu mi tiam vane serĉis la vortojn *gudzo* kaj *sutero*, kiujn mi ne komprenas kaj ne trovas en P.I.V. La presaĵo estas plaĉe klara sed kelkloke makulita pro la ŝajne postkomposta aldono de supersignoj sur majuskloj. Tamen, malgraŭ la etaj difektoj, mi ĝuis la romanon.

**J. H. Sullivan**

**Jaĥto veturas for . . . kaj veturigas la morton** de Deck Dorval. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1983, 21cm, 191p., broŝ.

Sur la jaĥto “Marfalko” okazas misteraĵoj: Kiel aŭguras la sangokolora kovrilo de la libro kaj ĝia ekstravaganca titolo, unu el la vojaĝantoj murdiĝas. Feliĉe, ĉeestas fama belga detektivo, kiu tuju komencas sian enketon inter la izola grupo de la ŝipveturantoj.

Se mi daŭrigus la resumon de la okazaĵoj aŭ pli detale priskribus la detektivon, oni verŝajne havus la impreson, ke mi recenzas krimrakonton de Agatha Christie pri aventuro de Hercule Poirot, ŝia simpatia belga detektivo. Efektive, Deck Dorval parodias – ne sen sukceso – la anglan verkistinon. Inter lia inspektoro Kant kaj ŝia Hercule Poirot estas tamen grava diferenco: Poirot estas valono, do franclingva belgo, dum Kant estas flandro el Antverpeno. En tiu senco ili eble estas rivaloj, ĝis kiam Kant pruviĝas profesie malpli kapabla ol Poirot, kvankam li pli sukcese solvas siajn privatajn problemojn. Sed mi ne tro anticipu la finon . . .

La mistera intrigo estas atentokapte rakontita en dudek-sep mallongaj ĉapitroj, tiel ke la libro estas senstreĉe legebla eĉ en malkoncentrigaj cirkonstancoj. La lingvaĵo estas simpla kaj konversacia, kvankam la aŭtoro iom tro ofte mallon-

gigas frazojn, anstataŭigante prepoziciajn konstruojn (*al, pri*) per simplaj akuzativoj. Tiu mallongemo ja estas lica, sed ne ĉiam respegulas la aktualan lingvouzon.

La teksto estas senfantazie, sed plaĉe kompostita. Ol librofinajn glosojn, mi tamen preferus paĝofinajn piednotojn, kiuj evitigas oftan foliumadon, des pli ĝenan, ĉar ili plurfoje klarigas nur la prononcon de apenaŭ uzataj nomoj, dum daŭre aperantaj familiaj nomoj ne estas priglositaj.

Tiu manketo tamen ne kompromitas la libron kiel tuton, kiu certe plaĉos al ŝatantoj de la ĝenro – eble eĉ pli ol la kutimaj krimromanoj sur nia libromerkato.

**Martin Haase**

**Hungaraj fabeloj**, Elek Benedek. El la hungara trad. Mária Benczik. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983 (2a eld.). Ilus. de Ida Csáky. 72p. 14 × 20cm. ISBN 963 571 1182. Prezo: 10,20 gld.

Elek Benedek (1859-1929), el kies fama “Hungaraj fabeloj kaj legendoj”, eldonita jam sepfoje, la dek rakontoj en ĉi tiu libreto estas ĉerpitaj, celis eduki la hungarajn infanojn, sed ankaŭ plenkreskuloj aprecos la brilan lingvaĵon de la esperanto-traduko. Kun la ilustraĵoj kiuj bone akordiĝas, la libreto inde omaĝas la aŭtoron.

La ĉefa kion li volas komuniki estas “pro bono atendu bonon”, kaj tiu estas ofta motivo en la fabeloj, kiuj temas pri fantazia mondo, kie nenio estas malebla: kie fiŝo kaj birdo parolas, ĉevalo flugas, kaj pro komplezo al museto malriĉa junulo gajnas la manon de reĝidino, kaj duonregon.

“Kiu ne kredas do kontrolu ĉion”.

**R. Y. Thyer**

**Saĝo-sako, Ĉinaj popoloj rakontoj**. Esperantigita de Fan Yizu. Polurita de Geoffrey Sutton. Ilus. de Tian Yuan kaj Jin Ming. Ĉina Esperanto-Eldonejo Pekino 1983. 11 × 18cm. Prezo £0.80

inkl. sendo-kostojn ĉe Esperanto-Centro 140 Holland Park Ave., London, W11 4UF.

La ĉina folkloro ampleksas grandan varion de temoj, sed la dek kvar rakontoj en ĉi tiu libreto ne spegulas tion. Kvankam ili devenas el vaste disigitaj regionoj, ili estas laŭteme similaj. En la plejmulto, loka heroo superruzas kaj punas riĉulon kiu montras sin stulta, aŭ tiraneca al siaj servantoj, kiuj vivas mizere. La rakontoj do, atakas la iaman socisistemon, kaj maljustecon flanke de aŭtoritatuloj; pri krueleco ĉe aliaj rolantoj tamen, ili ne tre atentigas.

La historietoj donas interesan ekrigardon en la vivmedion de foraj gentoj, kaj enhavas multe da humuro. Ĉio tio kun vigla verkstilo kaj ĉarmaj ilustraĵoj faras la libron facile legebla kaj amuza.

**R. Y. Thyer**

**Ukrainaj popolaj fabeloj**, de Nadija Hordijenko-Andrianova. Eld. Bulgara Esperanto-Asocio 1983. 80p. 16 × 22cm.

La aŭtorino donas fabelkolekton kiu taŭge reprezentas la riĉan varion de la ukraina folkloro, kiu "naskiĝas el la reala vivo kaj el la revo". Pri tio ŝi verkas simpatie en sia postparolo. La fabeloj instruas ke "bono ĉiam triumfas super la malbono", kaj amuzas per sprita dialogo.

Pro la disvastigado de fabeloj, iuj troviĝas plurlande, ĉi tie mi rekonis: "Vulpino kaj gruo", kaj kelkajn variaĵojn de tradiciaj temoj; ekzemple, "Rulkuketo", konata ankaŭ kiel "Mielkuka homo". Troviĝas ankaŭ aliaj malnovaj amikoj, bestrolantoj kun homa personeco: la ventkapa leporo, la ruza vulpo, kaj la komplezema sciureto.

Ekspluatante la flekseblecon de Esperanto, la aŭtorino atingas lingvaĵon ritme fluan por krei etoson de mirakla mondo, kaj donas al ni delectindan regalon.

**R. Y. Thyer**

**Ombro antaŭenĵetita** de Conan Doyle. Tradukis Ŝiger Ujeki, reviziis Manjo Austin. Eldonejo Iogi, Tokio 1983. 23p.

Kompreneble Conan Doyle verkis multajn novelojn krom tiuj, en kiuj rolis Sherlock Holmes. Mi estas dankema al la japana tradukinto pro tio, ke li konatigis al mi unu el ili. Ĝi estas vigla, kolorplena kaj streĉe interesa, kaj oni legas ĝin kun plezuro.

**W.A.**

### **Infana artkonkurso dum IMEK 1985**

Kadre de 5a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco 1985 en Schwerin/GDR, 8. - 14. 9. 1985, estas aranĝota centra ekspozicio kaj konkurso sub la temo "Mia kuracisto mia helpanto". Ni alvokas ĉiujn infanojn (ĝis aĝo de 14 jaroj) partopreni. La plej impresaj verkoj estos premiataj! La desegnaĵoj aŭ pentraĵoj devas esti A3- aŭ A4- formataj!

Sendu la objektojn bone pakumitaj ĝis 31. 5. 1985 al d-ro Klaus Bochmann, 9201 Bräunsdorf, Landambulatorium, GDR.

# **Londono ZOKAS**

*La historio de la unuaj 75 jaroj  
de la Londona Esperanto-Klubo,  
verkita de Harry Holmes.*

A5, kun 132 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.  
**£3, aŭ ekvivalento.** Mendu ĉel BEA,  
UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte de  
la Londona Esperanto-Klubo,  
153 Drummond Str., London NW1.  
Girokonto 54 661 0005.

# ANONCETOJ

Sp por ĉiu vorto. **Minimume 20 vortoj.**  
Antaŭpagenda.

**NACI-PAC-KONSILANTARO**, 29 Great James St., London WC1N 3ES, VOLAS HELPI VIN. Fondata en 1908, NPK estas ombrela organizado por 180 pac-grupoj.

**SOUTH PLACE ETHICAL SOCIETY**, Red Lion Square, London WC1R 4RL. Lectures and discussions every Sunday 11 a.m. Publishes ETHICAL RECORD.

**Mi estas** esperantisto kaj samtempe amatora bredisto de rasaj hundoj/francaj buldogetoj/. Mi deziras korespondi en Esperanto kun samideanoj el la tuta mondo pri la hundbredado kaj hundologio. Mi volas fondi la internacian hundologian Esperanto-grupon. Mia adreso: Andreo Blaszczyk, Przewodników Pracy 73/2, 53-325 Wrocław, Poland.

Loughborough University has extended the teaching of Esperanto in its Summer Programme for 1985. In one week (21st-27th July) Don Lord and Stephen Thomson will be teaching a course in "Practical Esperanto" at intermediate and advanced level, and in the following week (28th July - 3rd August) a half-day course for beginners is available (taken in conjunction with one of a selection of other courses from the programme). Write for a brochure of The Summer University to The Centre of Extension Studies, University of Technology, Loughborough, Leics. LE11 3TU.

**PRACTICAL ESPERANTO**. 20 - 22 September 1985, Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Alan Nutton, Stephen Thomson. This lively course is growing in popularity each year - book early! Further information from the Principal.

**Free introductory course:** All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, E.A.B. Membership Recruitment Campaign, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

**Press Panel:** Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Bristolington, BRISTOL, BS4 3PD.

**Local Representatives:** If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, Bradford, West Yorkshire, BD5 9AP.

**Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)** celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

## *Volas Korespondi*

S-ro Kaj S-ino Istvan VASS volas korespondi tutmonde. Respondos al ĉiuj leteroj. Adreso:- 6922 FOLDEA'K, Fozsef Au 16, Hungario.

Bernadett Lakatas, Ajka 8400, Nefelejjs u.11, Veszprem Migye, Hungario, 15-jara lernantino. Kolektas bildkartojn, sapon kaj kalendarojn.

Lakos Gabor, 15-jara gimnaziano, Attila u. 23, 6400 Kiskunhalas, Hungario volas korespondi kun britaj ge-Esperantistoj pri iu ajn temo. Interesas lin komputiltekniko kaj brita kulturo ankaŭ kolektas kalendarojn kaj mineralojn.

Császár Gyöző, Kórház tér 7, PÉCS, H-7627, Hungario kolektas ilustritajn poŝtkartojn pri urboj kaj ŝatus ricevi de grandaj urboj en Britujo.

F-ino Jola KRUK, 23-jara studentino pri angla lingvo, volas korespondi en Esperanto kun britaj samideanoj. Intereso estas:- libroj, vojaĝo, kinejo kaj teatro. ul. Nowodworska 25-16, PL-85-120 Bydgoszcz, Polando.

Okaze de Centjara Jubileo mi planas kompili vortarojn 'Mongola-Esp./Esp. Mongola' por gejunuloj, sed tre mankas al mi materialoj-Eng.Esp./Esp.Eng. vortaroj, ktp. Kiuj helpas per donacoj de utilaj libroj? Ts BATZAYA, Post Restante, C.P.O. 13, Ulan-Bator, P.R. Mongolia. Konsiloj pri vortarfarado ankaŭ petate, mi estas 19-jara.

Gelernantoj de mezlernejo en suda Pollando volas korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo: Esperanto-Klubo "Verda Amikeco", ĉe Mgr inĝ. Ubik Boguslaw, ul.Michalowicza 2/22, 43-323 Czechowice-Dziedzice, Pollando.